FN PER ANC 47

N° 236 JANUARO 2009

# NORMANDA ESPERANTO BULTENO

## ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas :Pierre Lemarchand, 2 les Terres Quemines 76113 Hautot sur Seine. Tel. 02 35 34 28 78
LEMARCHANDPI@wanadoo.fr
Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.

94-a Universala Kongreso de Esperanto
25.07-1.08.2009
Bjalistoko, Pollando
www.uea.org/kongresoj


**2009 : KONGRESU !**




kongreso2009.sat-amikaro.org

andrea.montagner@arciesperanto.it






65a Internacia Junulara Kongreso TEJO en LIBEREC Ĉeĥio, 18 - 25 julio 2009

## En tiu numero :



| | |
|---|---|
| Kasa raporto. | 2 |
| Bultenista raporto. | 2 |
| Historio pri nia bulteno. | 3 |
| Kotizoj - Abonoj 2009. | 3 |
| Listo de Kongresoj. Ĝeneralaj Kunvenoj- 1a parto. | 4 |
| Diametro de la tero. | 5 |
| Diversaĵoj. Kotizintoj. | 6 |



espéranto France

Esperanto France - Groupe Espérantiste Enseignement- Franca Katolika Esp. Asocio - Esperanto 10, kongresos en **TROYES** de la ***7a ĝis la 11a de majo 2009***

***Centre Sportif de l'Aube, 5 rue Marie Curie 10000 TROYES***
Informoj : http://esperanto10.free.fr
esperanto10@free.fr

Tel. 03 25 75 62 30 (Michèle)
03 25 76 63 21 (Daniel)

# Financa raporto pri la jaro 2008a

| ***ENSPEZOJ*** (Eŭroj) | | ***ELSPEZOJ*** (Eŭroj) | |
|---|---|---|---|
| **Ĉe CCP la 01/01/2008** | **2 859,36** | | |
| Kotizoj | 579,00 | Bulteno :<br>Eldonado : 215,00<br>Etikedoj por kovertoj : 16,73<br>Sendado :<br>leterkovertoj<br>+ poŝtmarkoj : 196,00 | 427,73 |
| | | CCP Administracio | 8,00 |
| | | KD por lokaj respondeculoj | 11,84 |
| Betteville renkontiĝo :<br>(Manĝoj + tranoktadoj). | 570,50 | Betteville renkontiĝo :<br>(Manĝoj + tranoktadoj). | 621,38 |
| **Sumaj ENSPEZOJ :** | **1 149,50** | **Sumaj ELSPEZOJ :** | **1 068,95** |
| | | **Ĉe CCP la 31/12/2008** | **2 939,91** |
| **Bilanco** | **4 008,86** | **Bilanco** | **4 008,86** |

**Kelkaj rimarkoj :**

Dum nia Ĝenerala Kunveno en Betteville, ni voĉdonis jese pri la asocia bilanco, kiu estis tiam (laŭ la 18 aprilo 2008 - kontoj kontrolitaj de nia amiko Pierre JOUVIN) : **2 983,79 Eŭroj**. (Ĉio en « Banque Postale » : Poŝt-Ĉek-Konto).

Vi trovas supre la novan bilancon je 31/12/2008

Ĉiam ĉe «Banque Postale» : **2 939,91** Eŭroj. Ni baldaŭ transdonos al Pierre JOUVIN, la asociajn kasajn dokumentojn de 2008, por kontrolado.

Vi povas konstati ke nia kunveno (dutaga) en Betteville havis malprofiton de : 621,38 - 570,50 = 50,88 Eŭroj. Tio estis la rezultato de tro malmultenombra partoprenantaro. Pro tiu malagrabla fakto, ni, tiam, komune decidis ne realigi la staĝon, kiu devis okazi en la sama loko dum septembro 2008.

Ni tamen devas memori, ke nia Ĝenerala Kunveno kiu okazis dum marto 2007 (nur unu-taga) en Grand Quevilly, kostis al nia asocio : 38,40 Eŭroj.

Pri la kostoj de la eldonado de la bulteno : (Temas pri la kostoj de fotokopioj : ni pagis 215 Eŭrojn; sed, per tiu elspezo, ni pagis la eldon-kostojn de la novembra 2008 (n°235a) kaj la ĉi-nuna januara numero (n°236a), kaj jam estas antaŭpagitaj, la kostoj de multopligado de la 5 venontaj bultenoj. (Tio estas : n° 237a ĝis n° 241a, kiuj aperos en 2009, kaj parte dum 2010) Tiamaniere, per abono, ni fine ŝparas monon.

**Pri la kotizoj :**

Por 1997 ni ricevis 74 kotizojn.

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 1998 | 79 | por | 2003 | : 78 kotizojn |
| 1999 | 93 | | 2004 | 76 |
| 2000 | 89 | | 2005 | 78 |
| 2001 | 92 | | 2006 | 74 |
| 2002 | 77 | | 2007 | : **79** |

kaj por la lasta jaro : **2008** : **63** kotizojn ......

Do, kelkaj forgesis pagi por tiu jaro ... ni baldaŭ relanĉos ilin.

Ĝis nun (la 20an de januaro 2009), ni jam ricevis 22 kotizojn por 2009.

**Pri la bulteno :**

Ni nuntempe sendas, por ĉiu numero de la bulteno :
Seine Maritime (76) : 39 bultenojn
Eure (27) : 7 bultenojn
Do **46** bultenoj por « **Haute Normandie** », kaj

Calvados (14) : 19 bultenojn
Manche (50) : 8 bultenojn
Orne (61) : 1 bultenon.
Tio estas **28** bultenoj por « **Basse Normandie** ».
Do entute **74** bultenoj alvenas en **Normandio.**

Ni sendas ankaŭ nian bultenon en Francio al **5** aliaj personoj, kiuj kotizas al nia regiona asocio; al **10** francaj landaj kaj regionaj asocioj, muzeoj, ni sendas interŝanĝe Normandan E° Bultenon. Tutsame kun aliaj **7** eksterlandaj adresoj ni interŝanĝas.

Do entute **96** ekzemplerojn ni sendas perpoŝte. Ni eldonas ĉiunumere **110** bultenojn.

***Pierre Lemarchand***

## Iom da Historio pri nia Normanda Ligilo, kaj Asocio ...

En la junia numero de 1970 de Normanda Esperanto Bulteno, aperis artikolo de nia karmemora amiko Edgard JOUIS, kiu loĝis tiutempe en Boisguillaume (Seine Maritime). La artikolo tiel komenciĝas :

*« Esperanto havas profundajn radikojn en Normandio. Estus tro longe fari kompletan historion de nia provinca movado. Ni nur lumigos kelkajn punktojn, foliumante niajn malnovajn bultenojn.*

*La grupo en Rouen estis fondita je Aprilo 1904, ĉe la fino de konferenco de Sro CART, Universitata Profesoro, farita sub la aŭspicio de « la Ligue de l'Enseignement ».*

*Jam la 2an de Aŭgusto, okazis eta internacia renkontiĝo, kie estis Francoj, Angloj, Germanoj... Oni ankaŭ baldaŭ eldonis presitan bultenon kiu daŭris ĝis la unua mondmilito ...*

*Kiam la movado restariĝis, oni denove eldonis bultenon, kiu daŭris ĝis februaro/marto 1940, kun la n°50 ....*

*Post la dua mondmilito, nia bulteno reaperas komence de 1946... ĝis nun : junio 1970»* ...

Ek de tiu numero (vidu paĝon 4an), mi provos daŭrigi la laboron de nia amiko JOUIS, helpe de la asocia bultena arĥivaro; dank'al resumaj tabeloj, mi trafoliumos la sinkvekvajn numerojn de nia normanda ligilo, do ni trapaŝos ankaŭ la historion de nia asocia vivo.

Mi komencos listigi la regionajn Kongresojn aŭ Ĝeneralajn Kunvenojn, kiuj ekzistis, ek de 1908 ...
Vi bonvolu vidi venontan paĝon ... Bonan legadon.

**Pierre LEMARCHAND**

La 199a numero de **LAŬTE** aperos fine de januaro 2009 !
Kontribuintoj el multaj landoj, interesplenaj legaĵoj :
**Cercle Amical Espérantiste de l'Agenais**
**47470 BEAUVILLE**




Abono por 6 numeroj
jare : **15 €**
Poŝtkonto :
Cercle amical
espérantiste
Bordeaux 3 371 74 M

**SAT-BROŜURSERVO** : pli ol 75 titoloj + 20 prilingvaj broŝuroj por varbi, inici, lerni, progresi, instrui .... Ĉe la sama adreso : Esperanto FR-47470 BEAUVILLE.

Cercle Amical espérantiste de l'Agenais :
sidejo, renkontiĝejo : Esperanto Cargue Sac
FR-47470 BEAUVILLE. Tel. : 05 53 95 40 26

## Kotizoj - Abonoj por 2009 :

**Esperanto France** 4 bis rue de la Cerisaie 75014 Paris
Tel. : 09.51.77.18.33. www.esperanto-france.org

| | |
|---|---|
| Cotisation : (chomeurs : 15 € ) | 33 € |
| Abonnement au « Monde de l'Esperanto » : | 30 € |
| Abonnement tarif réduit (Adhérents) : | 22 € |
| • *Universala Esperanto Asocio :* | |
| Cotisation : (avec Jarlibro) | 24 € |
| Cotisation, tarif réduit : (sans Jarlibro) | 10 € |
| Cotisation avec abonnement à la revue « Esperanto » : | 59 € |
| • *Esperanto-Jeunes :* | |
| Cotisation avec abonnement à la revue « Jeunesperanto-Info » : | 30 € |
| d° - pour étudiants, chômeurs : | 15 € |
| • *TEJO : (Association mondiale des Jeunes) :* | |
| Cotisation + abonnement à « Kontakto » et à « Tejo-Tutmonde » : | 24 € |
| - d° - + abonnement à la revue « Esperanto » : | 59 € |
| • *Abonnements à quelques revues :* | |
| - « Esperanto », revue de l'UEA : (11 n°s) : | 38 € |
| - « Heroldo de Esperanto » : (17 n°s) : | 39 € |
| - « Juna Amiko » : (3 n°s) : | 14 € |
| - « Komencanto » : (4 n°s) : | 18 € |
| - « La Kancerkliniko » (5 n°s) : | 25 € |
| - « La Ondo de Esperanto » (11 n°s) : | 38 € |
| - « Literatura Foiro » : (6 n°s) : | 36 € |
| - « Kontakto » (TEJO) : (6 n°s) : | 23 € |
| - « Monato » : (12 n°s) : | 49 € |
| - « Monato » : par internet : | 29,40 |
| - « Verda Lupeo/Fenikso » : (3 n°s) : | 17 € |

**Esperanto-INFO :** Les Bories de Coperlac.
Mas de Saint Chély. 48210 Sainte Enimie.
CCP. : n°11.901.46.B Marseille.
Abonnement + Adhésion: (6 n°s) : 20 €

**SAT-AMIKARO :** 132/134 Boulevard Vincent Auriol 75013 Paris. Tel. : 01.22.24.50.48.
www.esperanto-sat.info
CCP. : 37.852.90.L La Source.
Cotisation + abonnement à « La Sago » : 35 €
Abonnement simple à « La Sago » sans adhésion 32 €

**SAT :** Sennacieca Asocio Tutmonda : 67 avenue Gambetta. 75020 Paris. Tel. : 01.47.97.87.05.
www.satesperanto.org
Cotisation à SAT + abonnement à « Sennaciulo » (11 n°s) : 52 €
Abonnement simple sans adhésion : 57 €
Pierre QUILLAUD, 16 rue du Lt de Vaisseau Paris. 76120 Le Grand Quevilly.
CCP. : SAT-PERANTO : 17.333.10.N. Paris.


# Niaj regionaj Kongresoj kaj / aŭ Ĝeneralaj Kunvenoj

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1a **Kongreso** aŭ Ĝenerala Kunveno | Lisieux (14) | 19an de Julio 1908 | ***« des Groupes Espérantistes de Normandie »*** Prezidanto : Sro Rosey (Lisieux). |
| **2**a Kongreso | Le Havre (76) | 1an de Aŭgusto 1909 | *Fondiĝo de la* ***Normanda Federacio.*** Prezidanto : Sro Ducros (Le Havre). |
| **3**a Kongreso | Le Havre (76) | 28an Aŭgusto 1910 | Prezidanto : Sro Ducros. |
| **4**a Kongreso | Rouen (76) | 2an de Julio 1911 | Prezidanto : Sro Guersent. (Rouen). |
| **5**a Kongreso | Louviers (27) | 16an de Junio 1912 | Prezidanto : Sro Bontemps. (Louviers). |
| **6**a Kongreso | Bolbec (76) | 22an de Junio 1913 | Prezidanto : Sro Pitter. (Bolbec). |
| **7**a Kongreso | Sotteville les Rouen (76) | 24an de Majo 1914 | *Inaŭguro de strato « Zamenhof » en Sotteville les Rouen.* Prezidanto : Sro Cayeux. (Sotteville les Rouen). |
| **8**a Kongreso | Rouen (76) | 3an de Majo 1931 | Restarigo de la Normanda Federacio. |
| **9**a Kongreso | Sotteville (76) | 29an de Majo 1932 | Prezidanto : Sro Robin (Sotteville). |
| **10**a Kongreso | Les Andelys (27) | 7an de Majo 1933 | Prezidanto : Sro Jouis (Boisguillaume). |
| **11**a Kongreso | Rouen (76) | 6an de Majo 1934 | Prezidanto : Sro Saget (Elbeuf). |
| **12**a Kongreso | Elbeuf (76) | 19an de Majo 1935 | Prezidanto : Sro Saget |
| **13**a Kongreso | Lisieux (14) | 24an de Majo 1936 | Prezidanto : Sro Saget |
| **14**a Kongreso | Le Havre (76) | 18an de Majo 1937 | Prezidanto : Sro Pissaro (Les Andelys) sed rezignis poste. |
| | Rouen (76) | 22an de Majo 1938 | *Federacia Tago.* |
| | Sotteville (76) | 21an de Majo 1939 | *Federacia Tago.* Prezidanto : Sro Robin (Sotteville). |
| **15**a Kongreso | Rouen (76) | 12 de Majo 1946 | Prezidanto : Sro Jouis (Boisguillaume). |
| **16**a Kongreso | Evreux (27) | 11an de Majo 1947 | *Naskiĝo de* ***Unuiĝo de Normandaj Esperantistoj.*** |
| **17**a Kongreso | Fécamp (76) | 1948 | |
| **18**a Kongreso | Honfleur (14) | 22an de Majo 1949 | Prezidanto : Sro Bosc (Le Havre). |
| **19**a Kongreso | Le Havre (76) | 13/14 de Majo 1950 | Prezidanto : Sro Bosc. |
| **20**a Kongreso | Rouen (76) | 27an de Majo 1951 | Prezidanto : Sro Bosc. |
| **21**a Kongreso | Evreux (27) | 18an de Majo 1952 | Prezidanto : Sro Bosc. |
| **22**a Kongreso | Caen (14) | 10an de Majo 1953 | Prezidanto : Sro Bosc. |
| **23**a Kongreso | Le Havre (76) | 15/16an Majo 1954 | Prezidanto : Sro Bosc. |
| **24**a Kongreso | Fécamp (76) | 23/24 Aprilo 1955 | Prezidanto : Sro Bosc. |
| **25**a Kongreso | Rouen (76) | 5an de Majo 1956 | Prezidanto : Sro Bosc. |
| **26**a Kongreso | Caen (14) | 4/5 Majo 1957 | Prezidanto : Sro Duthilleul (Caen). |
| **27**a Kongreso | Le Havre (76) | 17/18 Majo 1958 | Prezidanto : Sro Huet (Le Havre). |
| **28**a Kongreso | Evreux (27) | 2an de Majo 1959 | Prezidanto : Sro Huet. |
| **29**a Kongreso | Domfront (61) | 14/15an Majo 1960 | Prezidanto : Sro Huet. |

*Daŭrigota... en la venonta bulteno !*

# La Diametro de la tero

La antikvaj grekoj estas la unuaj kiuj, ek de la 5a jarcento A.K., komprenis ke la tero ne estas senfina plataĵo, aŭ plataĵo limigita ĉiudirekten de kosmaj abismoj, sed sfero. Tion sugestis al ili la evidenta fakto ke la suno kaj la luno estas rondaj. Krome, la lumo eĉ seninstrumente aspektas kiel sfero. Kiel aliaj antaŭaj popoloj ili ankaŭ komprenis ke la fenomenoj de eklipsoj fontas el la pasado de astro antaŭ alia, kiun ĝi kaŝas. Tiel ili rimarkis ke la ombro de la tero sur la luno dum luneklipso estas kurba.





Krome, ili ankaŭ estis rimarkintaj ke ŝipo kiu surmare malproksimiĝas de la bordo ŝajnas enprofundiĝi en la akvon, kaj malaperas, eĉ se ĝia distanco al observanto estas ankoraŭ tute sufiĉa (kompreneble dum taglumo kaj bonaj veterkondiĉoj), por ke ĝi estu videbla. Tiel la ŝipŝelo povas esti tute malaperinta sub la horizonto H kiam male la mastoj estas ankoraŭ perfekte videblaj. (Vidu la ĉi supran krokizon).

Do se la tero estas sfero, sin prezentis la demando de ĝia diametro. En la anktikvaj tempoj, la diversaj popoloj kiuj apudis la Mediteraneon relative bone konis la mondon ĝis la Ĝibraltara markolo, la Kanariaj insuloj laŭ la afrika marbordo, Etiopio, Hindio,... Sed transe, kio estis ? Je kiu distanco troviĝis la antipodoj, ĉu ili estis atingeblaj ? Laŭ kiom da stadioj daŭris la tero ?

La grekoj jam posedis sufiĉe da matematikaj kaj geometriaj konoj por ke la astronomo Eratosteno kapablu mezuri la diametron de la tero kun kontentiga proksimeco. Tio okazis en la 3-a jarcento A.K.. Jen kiel faris Eratosteno :

La tago de la somera solstico, je tagmezo, objekto kiel paliso, vertikale metita sur la tero, havis nenian ombron en Sieno (S) (= Assouan) apud Nilo : La suno estis je zenito kaj ĝiaj radioj falis vertikale sur la teron kiel indikite sur la ĉi apuda krokizo. La sama tago je la sama horo, en Aleksandrio (A), obelisko AB havis mezureblan ombron AC. La kono de la longoj AB kaj AC ebligas koni la angulon æ de la direkto S de la suno kun la loka zenito Z'.




La ĉecentra angulo AOS egalas 'æ', ĉar ambaŭ anguloj estas alternaj-internaj laŭ la tera radiuso OB kiu trairas la du paralelajn liniojn de la sunradioj.

Eratosteno trovis 7° 12' kiel valoro de 'æ'. Tiam oni taksis je 5000 stadioj (1 st. = 157,5 m) la distancon inter Aleksandrio kaj Sieno. Eratosteno kiu sciis ke cirklo ampleksas 360°, faris la regulon de tri kaj trovis la cirkonferencon de la tero :

$\frac{5.000 \times 360}{7° 12'}$ = 250.000 (39.375 kmj),
anstataŭ la ekzaktaj 40.000 kmj.

De tio li deduktis la diametron : 12.533 kmj (anstataŭ 12.733 kmj).

***Henri ROUSSEAU***

**Vacances 2009**

Vous préparez déjà les prochaines vacances. N'oubliez pas de consulter le guide « Tourisme et Espéranto » - **www.gvidilo.org** - Vous y trouverez des chambres d'hôtes, un hôtel, un café, un antiquaire où l'on parle espéranto. Il y a aussi deux terrains de camping, une maison familiale associative, des musées dont les sites internet sont en espéranto, sans oublier de nombreuses fiches touristiques.

# ESPERANTO - NORMANDIE

***Une ouverture sur tous les peuples, toutes les cultures***



***ČEKOSLOVAKIO : 1961. Tutmonda ekspozicio de poŝtmarkoj « Praga 1962 »***

## Kvara listo de kotizintoj por 2008

Rigardu ĉu via nomo estas en la ĉi-suba **KVARA** listo : Ge-Sinjoroj :

BESSIERE, *GASCOIN*, LARDEUR, *LEVY*.

## Dua listo de kotizintoj por 2009




***AŬSTRIO : Junio 1949 : esperantista kongreso en Graz.***

**DUA** listo : Ge-Sinjoroj :

DEFRANCE, *DUBOIS*, GIBERT, *HELBERT*, LEBRUN, *LECOUVREUR*, LESUEUR, *LEVESQUE*, LEVY, *LOISEL*, MAGEREL, *MICHAUD*, PAUMIER, *SCHERTZER*, SERY.

Faru vian ĉekon profite de **ESPERANTO-NORMANDIE CCP 283 40 H ROUEN**
**Abon-kotizo por 2009 : 8 Eŭroj**, kaj sendu ĝin al la kasisto .

Pierre Lemarchand, 2 Résidence Les Terres Quemines. 76113 Hautot sur Seine.

### *Ferioj 2009*

Vi jam antaŭvidas la venontajn feriojn. Ne forgesu konsulti la gvidilon « Turismo kaj Esperanto » - **www.gvidilo.org** - Vi trovas gastĉambrojn, hotelon, kafejon, antikvaĵejon kie esperanto estas parolata. Esperantlingvaj informoj estas legeblaj pri du kampadejoj, asocia familia domo, muzeoj. Turismaj slipoj ankaŭ estas haveblaj.

**Parto de la ĉeestantaro, en Betteville lastjare, dum la Ĝenerala Kunveno**

